

n-ro 20

(4 / 1997)

Membre de la LEA-Komitato de SAT (Parizo)

LEA/G



MAGAZINO

Organo de la Libera Esperanto-Asocio per germanlingvaj regionoj
Organ des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete

Magazino kaj dulingveco

En *Magazino* n-ro 19 Albert Stephan, Gary Mickle kaj K. H. Kersting traktis ĉi-tiun temon. Mi inklinas pli al la opinio de K. H. Kersting, ke dulingva bulteno nemulte helpas aŭ servas al nia afero. Kompreneble, se estas iam unuopa artikolo en germana lingvo kiel escepto, mi ankaŭ jesus.

Sed, se mi bone komprenis la aferon, ja ne temas pri dulingva gazeto, sed pri apuda germanlingva, kiu servu inform- kaj varbcele. Gary Mickle ja skribis: «Germanlingva bulteno estu(s) direktita al ne esperanista publiko kun bezono je tre bazaj informoj pri la lingvo mem, ĝia aplikado, ĝia komunumo kaj.....»

Jes, tio estus subteninda, sed ni atentu bone, tia publika «varbilo» devus esti laŭ aspekto bona kaj laŭ enhavo modela kaj serioza. Kaj tio ne nur kostus monon sed ankaŭ multe da laboro, ĉar iomete fuŝita bulteneto povus havi la tute kontraŭan efikon.

Ĉu tiu «varbilo» krome ankaŭ celu tion, kion Gary Mickle aludis en la daŭrigo de la citita frazo, nome «kaj tute aparte pri ĝia laŭ mi ne bagatela loko en la sortimento de maldekstraj (aŭ progresivaj) strebadoj», mi pridubas. Tio ne povas esti la tasko de tia varbilo kaj povus eĉ havi la tute kontraŭan efikon. Tia diskutado havu lokon en nia bulteno mem kaj estu esperantlingva.

Aliflanke troviĝas en la fino de la artikolo de Gary Mickle ankaŭ la jena frazo: «Mi tamen kredas, ke la potenciala rolo de la Esperanto-movado, resp. de Esperanto en la batalo por radikale alia socio estas nia temo». Ĉar tiu aludo troviĝas kvazaŭ dufoje en la artikolo de G.M., mi volonte aŭdus de li, kiel laŭ li aspektu tiu «radikale alia socio» kaj kiumaniere oni atingu ĝin. Dum la lasta jarcento trifoje venis homoj kaj postulis radikale alian socion kaj tiu postulo finfine ĉiufoje kondukis al malhoma diktatora reĝimo, ĉu nigra, ruĝa aŭ bruna.

Ni do estu atentemaj, kaj tiu, kiu uzas tiajn vortojn aŭ politikajn ĵargonojn klarigu detale, kion li celas aŭ komprenas je tiuj esprimoj. Pro tio mi

petas, ke Gary Mickle klarigu tion en unu el la venontaj *Magazinoj*.

F. Bues

Noto de G. Mickle

Mi volonte respondos al tiu tute legitima demando de k-do Bues, sed mi efektive preferos fari tion en unu el la venontaj numeroj – la respondo povas iĝi iomete longa kaj mi nun ne volas akapari pli da spaco en la *Magazino*, ol mi jam faris por la artikolo pri flugfolia infomado (paĝoj 5 ĝis 8).

Enhavo:

	paĝo
Magazino kaj dulingveco (F. Bues)	1
Gustigo	2
«Neŭtrala» SAT-kongreso (Gerd Bussing)	2
Novaĵoj	2
Ĉu ni restas sur la vojo de kruela egoismo (Ismael Gomes Braka)	3
Naciismo, tolero kaj lingvo de Zamenhof (KHK)	4
Atentigo de I. Bociort	4
Disdonado de flugfolioj: ĉu neprave neglektata metodo de informado? (G. Mickle)	5
Mia penso / <i>Meine Gedanken</i> (L. L. Zamenhof / trad. M. Retzlaff)	9
Ĉu Esperanto estas politika afero?	9
Lingva angulo: Pri «Idiotismoj» (W. E. Collinson)	10
el: Laborista Esperanto-movado antaŭ la [unua] mondmilito (G. P. de Bruin)	11
Ĉu vi jam estas esperantisto? (A. Stephan)	12
Aforismoj	12

Gustigo

En la lasta numero 19 de la *Magazino* troviĝas miskompreniga eraro, pri kiu nin atentigis k-do Bues, kaj kiun kulpis la subskribinto:

En la unua alineo de la artikolo *Nia hejmpaĝo en Interreto* sur paĝo 10 la nomoj «*Deutscher Esperanto-Bund*» kaj «*Germana Esperanto-Asocio*» legiĝu: *Deutscher Arbeiter-Esperanto-Bund* kaj *Germana Laborista Esperanto-Asocio*.

Mi pardonpetas al la eble perpleksiĝintaj legantoj.

G.M.

«Neŭtrala» SAT-kongreso

Jam la trian fojon SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) elektis Aŭgsburgon kiel sian kongresurbon. De la 2a ĝis la 8a de aŭgusto tie kunvenis ĉ. 150 homoj. Bedaŭrinde, multaj aliĝintoj el la orientaj landoj ne povis veni pro nericevo de vizo.

Nature, sociaj kaj ekonomiaj temoj formis la kernon de la kongresa programo. La socialdemokrata parlamentano Harald Güller informis pri «Germanio nuntempe», elstarigante la problemojn de senlaboreco kaj la solvproponojn de lia partio. D-ro Cwick, deputito de la Eŭropa Parlamento kaj mem esperantisto, faksperte kaj verve parolis pri eŭropa valuto «eŭro» kaj ĝia laŭdira utileco.

Ĉiumatene okazis trihoraj laborkunsidoj, dum kiuj oni diskutis kaj disputis pri diversaj SAT-koncernaj demandoj. Posttagmeze, en fermitaj rondoj, ariĝis la t.n. frakcioj de SAT.

Ne tute mankis esperantologiaj programeroj: d-ro Werner Bormann prezentis kelkajn el la nun-

tempaj aktivaĵoj de la Akademio de Esperanto, kies prezidanto li estas. El la buŝo de d-ro Reinhard Föbmeier ni aŭdis spritajn konstatojn pri la internacieco de Esperanto-parolturnoj. El la kultura programo menciindas la kantaj prezentoj de la ĉeĥa operkantisto Miroslav Smyčka kaj la – ne unuafoje – surscenigo de la teatraĵo «*La Aŭdienco*» de Vaclav Havel.

Ĉe bela somera vetero ni povis ĝui interesajn ekskursojn, ekz. tuttage al la urbeto Weltenburg kun siaj aktivaj monaĥejo kaj pitoreska ĉirkaŭaĵo. Apude, en la regiono Hellertau oni montris al ni la plej grandan produktojn de lupolo (nemalhavebla ingredienco por fari bieron) de la tuta mondo. Kaj nelaste ni konatiĝis kun la arkitekturaj kaj artaj riĉaĵoj de la unika urbo Aŭgsburgo. Krono de la urba rondveturo estis akcepto ĉe la urbestro en la luksa «ora salono» de la urbodomo.

Kritike necesas rimarki, ke – eble nur por ne-SATano – la specifa SAT-karaktero de la kongreso ne estas sentebla. Ĉu kunvenis ĉefe laboristoj, SAT-simpatiantoj, simplaj esperantistoj aŭ nuraj kongresemuloj? Pri socialaj kaj sociaj problemoj, subpremo, neegalrajteco ktp. oni nuntempe ĉie debatas, ankaŭ en la tiel nomata «neŭtrala» movado. Mankis originaleco de la koncepto, mankis klara laŭtempa profilo kaj mankis – la junularo.

Gerd Bussing

[Ĉi tiu artikolo estas interesa, ĉar ĝia verkinto antaŭe ne intime konatiĝis kun SAT kaj alportas la impresojn de eksterulo. Ni transprenis ĝin kun lia permeso el la *Berlina Informilo* 1997 09. G.M.]

NOVAĴOJ

Hungarlanda SAT-Infomilo

Sub tiu nomo ekaperis nova bulteno redaktata de la hungara peranto de SAT, Apáti Kovács Béla, kiu skribas: «*Nia celo estas eldoni kvaronjaran informilon pri la hungarlanda SAT-movado.*». La ĉefartikolo de la unua numero pri la hungaria laborista movado pritraktas diversajn baraktojn de la hungara proletaro ĉi-jarcente. Senpagaj kopioj haveblaj de H-7400 Kaposvár, Béla kiraly u. 44., Hungario. (*LEA-Ligilo* 1997 07)

Enrompiĝo ĉe la SAT-sidejo

Laŭ freŝdata informo, okazis komence de septembro enrompiĝo en kelkaj ejoj de la sidejo de SAT en Parizo. Tiu atako eble estas ligita kun la konata proceso kun la najbaro pri la uzo de ĝuste tiuj ejoj. Tiu pro-

ceso finiĝis favore por SAT. Okaze de la enrompiĝo, valoraj arkivejaj materialoj estis disĵetitaj sur la korto. Pliajn detalojn la redakcio ankoraŭ ne scias.

PREM kaj ERA

La Popola Rusia Esperanto-movado PREM, kiu celas kunlabori kaj kun SAT kaj kun la «*Esperanto*» Radikala Asocio ERA kaj pri kies fondiĝo ni raportis en *Magazino* 19, nomumis komisiiton pri rilatoj kun ERA, M. Ĉertilov, kiu membras jam en ERA. La sekretario de ERA reagis per la informo, ke ĝi kontraŭas la fondon de tiaj organizaĵoj kaj tiu-maniere uzadon de la siglo ERA sen la antaŭa aprobo de ĝiaj gvidantoj. La *ILEA-Infomilo* (de la Itala LEA) konstatas, ke tiu sinteno malfaciligas komunajn iniciatojn kun ERA. (*ILEA-Infomilo* 1997 06)

ILEA kaj PDS

La Itala LEA celas starigi rilatojn de reciproka kunlaborado kun la partioj de la maldekstro, do ankaŭ kun la PDS, la (itala) Demokratia Partio de la Maldekstro, postsekvanto de la Komunista Partio de Italio. La nova statuto de PDS ebligas al membroj la starigon de aŭtonomaj temaj grupoj, en kiuj partoprenas ankaŭ ne-partianoj. ILEA konstatas, ke ĝia membraro malsuperas la postulatan kontingenton, sed ĝi esperas ricevi specifan escepton, kion eksplicite antaŭvidas la statuto. Tiaj temaj grupoj ene de PDS devus ankaŭ naskiĝi je loka nivelo en almenaŭ kvin regionoj.

Jam la februara membrokunveno de ILEA traktis la problemon de la ĝisnuna neintereso pri Esperanto en granda parto de la demokratia maldekstro de Italio kaj diskutis eblojn

por supervenki ĝin (kiel ankaŭ la eblecon havi estonte paĝaron en Interreto). (*ILEA-Infomilo* 1997 06)

Esperanto en FAU

La nove aperinta sepa (1997 aŭgusto) numero de *FAU-Ĝisdatigo* resumas la poresperantan agadon komencitan en 1994 en la *Freie ArbeiterInnen-Union (Libera Laborista Unuiĝo)*, kiu inkluzivas la regulan aperigon de Esperanto-kurso, poste de Esperantlingva kolumno en la FAU-gazeto *Direkte Aktion* kaj la kvintagan kurson por komencantoj gviditan de la germania SAT-peranto Jiří Proskovec.

La koncerna artikolo konstatas: «Dank' al tia paŝopostpaŝa propagando la sinteno de la FAU-anaro ŝanĝiĝis de la kutima skeptikeco al supraĵe pozitiva rilato. Dum la lastaj du jaroj proksimume trideko da FAU-membroj ekesperantistiĝis... La nombro de parolfluaĵ esperantistoj inter la ĉ. 150 membroj de FAU estas

malgranda kaj ne estas klare, ĉu ĝi kreskas. Sed sukcesis al ni trarompi la muron de nescio kaj antaŭjuĝoj rilate al Esperanto. Espereble ni kreis solidan fundamenton por pli konvinkaj paŝoj en estonteco.»

La *Ĝisdatigo* aŭ informoj haveblas de la redakcio ĉe Will («Volo») Firth, Lychener Str. 73, DE-10437 Berlin (tel.: +49-30-444 8398 kaj retroŝto: faub@anarch.free.de.)

Marŝo por Socia Justeco

Ankaŭ esperantistoj (kune kun pli ol 10.000 aliaj homoj) partoprenis la aprilan Marŝon por Socia Justeco en Londono, kiu celis komuniki al la nova Laborista registaro, ke oni ne fidos ekskluzive je parlamentaj iniciatoj por defendi sin kaj siajn interesojn. La Marŝon subtenis interalie mediaj aktivistoj kaj organizaĵoj de laborantaj rifuĝintoj kaj favoraj al azilpetantoj. (*La Verda Proleto* 1997 07)

53a SAT-Amikara Kongreso

La venonta kongreso okazos en la bretona urbeto Quintin (departemento Côtes-d'Armor) de 1998 04 11-13. «La Kongresanoj engastiĝos en tre agrabla kongresejo kuŝanta en kadro el freŝa verdaĵo apud lageto ĉe la piedo de kastelo datiĝanta de la 17-a jarcento.» (*SAT-Amikaro* 1997 06)

Universitata Tezo

Universitata tezo, kies aŭtoro estas la nepo de Ivo Guilheneuf (pseŭdonomo: *Ivon*), estis antaŭnelonge aprobita. Temas pri la vivo de Ivo Guilheneuf, restadinta dum pli ol 10 jaroj en Sovetio, kunverkinto kun Lanti de *Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?* (1935). Plej gravaj informoj fontas el leteroj senditaj pri la politikaj-ekonomiaj cirkonstancoj al Lanti, la fondinto de SAT. (el: *La Parizano* 1996 11)

Ĉu ni restas sur la vojo de la kruela egoismo?

Ismael Gomes Braka, Brazilo, skribis en la jaro 1933:

En la momento kiam mi verkas ĉi tiun artikolon, la Londona Mondkonferenco eklaboras. Mi tute ne povas antaŭvidi ĝiajn decidojn, kaj iom skeptike mi atendas la rezultatojn de tiu giganta kunveno; tamen por mia celo ĉio jam estas atingita: – la plej eminentaj regnestroj kaj ekonomiistoj jam konfesis tute sincere, ke la mondo estas en profunda abismo, ke dum milionoj da homoj malsatas kaj mortas en mizero, aliaj estas devigataj forbruligi tritikon, maizon, ŝafarojn, kafon, k.a. pro manko de aĉetantoj.

En sia saĝa artikolo titolita «Maŝinoj kaj senlaboreco», aperinta en la februara-marta numero de *Oomoto Internacia*, nia eminenta germana samideano d-ro Joh. Dietterle montras, ke la progreso nepre daŭrigos sian vojon, ĉar la mondhistorio ne iras returne, kaj ke la teknika evoluado ne povas esti reen turnata, kaj li finas sian artikolon per jenaj vortoj: «Estas nur necese, ke la homaro ligu kun la teknika kapableco la necesajn moralajn kvalitojn».

La afero ja estas tute simpla: senlaboreco nur povas ekzisti, ĉar la homoj ne sufiĉe disdividas la farotan laboron. Se anstataŭ kvardek horoj po semajno, la tuta laboro povas esti farata nur en kvar horoj, ni uzu la ceterajn 36 horojn por lernado, promenado, amuzado, arto ktp.

Espereble venos tempo, kiam la homo tute ne laboros en la nuna senco de la vorto, ĉar la

maŝinoj faros ĉion necesan, kaj la homaro estos tiam multe pli riĉa ol nuntempe.

Se amasego da homoj estas senlaboraj, kaj samtempe oni devas forbruligi multegon de la plej utilaj produktaĵoj pro manko de aĉetantoj, kiel sincere konfesis la plej eminentaj ekonomiistoj en la Londona Mondkonferenco, kompreneble la malriĉeco ne plu rajtas loĝi en nia mondo; ĉar la homoj jam progresis sufiĉe en la produktarto, por ke ĉiuj estu riĉaj kaj la mizero por ĉiam malaperu de la Tero. Se multe da niaj homfratoj restas ankoraŭ en mizero, tion nur klarigas la senkompata egoismo de nia materialisma civilizacio. Vere tiu egoismo nin dividas laŭ klasoj kaj nacioj, kaj malfeliĉigas samtempe ĉiujn per reciproka batalado anstataŭ kunhelpado.

De nun, tamen nia civilizacio konfesis per la buŝo de siaj plej altaj reprezentantoj, ke vole-nevole ĝi devas ŝanĝi sian vojon kaj fariĝi pli homarana. Homamo jam ne estas simpla fantazio de revemaj idealistoj, sed nepre bezono por la vivado mem de la homaro.

Se ni daŭrigus nian marŝon sur la sama vojo de la kruela egoismo, malgraŭ la teknika evoluado, en proksima estonteco la malsatularo estus tiel grandnombra, kaj la riĉularo tiel malgrandnombra, ke ĉi tiu lasta nepre pereus en klasbatalo. Nova ideo pri homaranaj devoj sin trudas do eĉ al malriĉkoraj egoistoj, kaj ĉiu homo fine komprenos, ke homamo, solidareco, interdependo, reciprokeco, aŭ homfrateco ne estas simpla revo, sed natura leĝo, kiun oni ne rajtas malobei.

Naciismo, tolero kaj lingvo de Zamenhof

Mi skribis aliloke, ke la du plej grandaj malbonoj de nia jarcento estas naciismo kaj maltoleremo. Se mi revenas al tiu temo, tion kaŭzas ĉefe la fakto, ke eĉ al multaj esperantistoj ne estas evidenta la malboneco de tiuj du aferoj, malgraŭ tio, ke Zamenhof mem tute klare estis nepolitika sennaciulo, kaj pledanto kaj praktikanto de tolero. Iuj esperantistoj, erarigitaj de, cetere komprenebla, sentimenta sento pri la peceto de la terglobo, kie ili naskiĝis aŭ edukiĝis, protestas, ke la nacioj estas fakto, kontraŭ kiu estas vane aŭ malutile agiti. Laŭ mi, estas kvazaŭ diri, ke Dio estas fakto, kontraŭ kiu estas vane aŭ malutile agiti. Ĉiukaze, kancero estas ja fakto, sed ĝis nun ne aŭdiĝis voĉoj asertantaj, ke oni ne kontraŭbatalu ĝin! La koncepto de naciismo estas, je la nuna evolustadio de la homa sociaro, malbona kaj malutila, interalie ĉar ĝi malhelpas la ekonomian unuiĝon de la homaro, sed ankaŭ ĉar ĝi rekte kontribuas al la militismo, pro tio, ke senskrupulaj aŭ nur stultaj politikistoj povas sur patriotisma bazo akceptigi militon kaj multajn aliajn fiaĵojn al la homamaso.

La koncepto pri nacieco estas malpreciza kaj artefarita ideo, reprezentinta stadion en la socia evoluo de la homaro. Ne ekzistas kontentiga difino de la nacio; hodiaŭ ĝi estas nek politika nek geografia unuo (la angla kaj skota «nacioj» ne posedas nacian suverenecon, kiel ankaŭ ne la serba kaj kroata «nacioj»); nek lingva unuo (france parolantaj «belgoj» ne enkalkulas sin en la francan «Nacion», dum la «belga nacio» konsistas el du tute malsimilaj lingvaj komunumoj); nek kultura unuo (la svisa «nacio» estas kungluaĵo de kvar tute apartaj kulturaj tradicioj); nek, evidente, rasa unuo (kiel ajn oni difinas la vorton «raso»). Ĝi ankaŭ ne estas, en la dudeka jarcento, ekonomia unuo, kvankam ekspluatantoj klopodas krei la iluzion, ke ĝi estas tia. Ni povas tamen diri, ke la nacia unuo ja iam prezentis stadion en la socia kaj ekonomia evoluo de la moderna homaro, kaj ke la koncepto pri nacieco ankoraŭ postrestas la malaperon de la nacio kiel reala tia unuo. La koncepto pri nacieco estas tre nova aperaĵo, ĉar ĝi estis nekonata en okcidenta Eŭropo antaŭ 500 jaroj, kaj en Germanujo, Italujo kaj orienta Eŭropo antaŭ 150 jaroj. Sekve la nacieca koncepto ne estas io «natura» aŭ «eterna», kaj en la moderna mondo ĝi devus esti jam arkaika.

La moderna mondo similas al la «Germanujo» de la frua deknaŭa jarcento. Tiam la moderna Germanujo konsistis el grandega aro de tute malgrandaj ŝtatoj, ĉiuj sendependaj kaj aŭtonomaj; ĉiu havis propran monsystemon, propran doganon, k.s. La stulteco de tiu aranĝo hodiaŭ ŝajnas al ni mem evidenta; sed ne ĉiuj rimarkas la stultecon de simila aranĝo tra la tuta hodiaŭa mondo, en kiu neniu «nacio» estas vere sendependa. Neniu komunumo tra la tuta mondo, escepte – eble – kelkajn izolitajn insuletojn en suda Pacifiko, estas, aŭ povus esti, memstara, kaj netuŝata de ekonomiaj kondiĉoj en alia parto de la terglobo. Kaj tamen la mondo estas pli-malpli arbitre dividita en ŝtatojn konkurantojn, reciproke rivalajn, kiuj ofte utiligas por siaj celoj la pli romantikan nomon

«nacioj», tranĉante la gorĝon unu al alia por akiri al si pli grandan porcion de la terriĉaĵoj. Al la akceptigo de tiu artefarita kaj malmorala situacio kontribuas pluraj tute arbitraj faktoroj, kiel ekzemple diferencoj de haŭtkoloro, religio, kulturo, k.s. El ili, la plej grava kaj plej fundamenta tre verŝajne estas la lingvaj diferencoj. Homoj, kiuj ne kapablas komunikiĝi, estas nature suspektemaj unu pri la alia, kaj rimarkas ĉefe la suprajajn diferencojn inter si, kaj ne povas percepti la fundamentajn similaĵojn. La genio de Zamenhof, kiel ni ĉiuj scias, brile sukcesis forigi tiun barilon, kaj komunikiĝante per Esperanto la homoj povas konstati la suprajcon de la pli frue realŝajna «nacieco».

Tamen restas, kompreneble, tre realaj diferencoj inter la homoj (diferencoj, kiuj, kiel la klasaj diferencoj, ekzistas tute senkonsidere pri «naciaj» aŭ ŝtataj landlimoj), kiel ekzemple diferencoj de temperamento, vivkoncepto, religio, manĝkutimoj, vestaĵoj. Kaj, por ke la homoj kunvivu – ĉu laŭ monda, ĉu laŭ strata, nivelo – estas necese, ke ili reciproke toleru, kiel individuoj, tiujn diferencojn, kiujn ili nepre neniam sukcesus forigi, ĉu persvade, ĉu perforte. *La plej grandaj teruraĵoj estas ĉiam kaŭzitaj de homoj, kiuj konvinkiĝinte pri sia propra pravo, nepre intencis devigi la aliajn homojn konformi sin al ilia konvinkiĝo.* Toleremo estas necesa ĉar 1-e absoluta pravo ne ekzistas; 2-e kio estas prava por unu estas malprava por alia; 3-e neniam ĉiuj homoj konvertiĝos al unu koncepto; 4-e oni ne povas perforte detrui ĉiujn malsamopiniantojn; 5-e perforto ĉiukaze estas malmorala kaj fine detruas la perfortintojn; 6-e sen tolero ne ekzistas eĉ ebleco de daŭra paco. Evidente, tamen, tolero devas esti reciproka (ĉar, kiel militemo unuflanka kaŭzas militon, tiel ankaŭ maltoleremo unuflanka kreas perforton), kaj same evidente, oni ne toleru rektajn maljustaĵojn.

Sed eĉ en plej bona okazo, tolero estas neebbla sen kompreno, kaj kompreno estas neebbla sen komuna lingvo. Esperanto ebligas interkompreniĝon kaj sekve, eventuale, ankaŭ toleron. Tute senkonsidere pri aliaj faktoroj, ĝi estas la nemalhavebla antaŭkondiĉo por forigi de la du grandaj malbonoj de nia jarcento: la naciismo kaj la maltoleremo.

KHK

Atentigo de I. Bociort

Prof. d-ro I. F. Bociort el Berlino atentigas, ke li estas la aŭtoro de unu el la kontribuoj por la rubriko «Ĉu Esperanto estas politika afero?» en *Magazino* 19: nome, li verkis la trian el la kvar kontribuoj, kiu komenciĝas per la vortoj «Prave, lakonaj respondoj estus...». Ĉar li pro gravaj kialoj deziras publike sciigi tion, ni volonte komunikas tiun fakton, kvankam la redakcio estonte restos (nur en la nomita rubriko) ĉe la principo de anonima publikigo.

Disdonado de flugfolioj: ĉu neprave neglektata metodo de informado?

Ni komencis disdoni flugfoliojn en 1995. En tiu jaro la *Maldekstra Forumo Berlino* partoprenis la post-manifestacian publikan feston de la Unua de Majo organizitan de la Germana Ligo de Sindikatoj. Tie ni malvolvis grandan, tiucele preparitan sloganbendon kaj disdonis preskaŭ 600 priesperantajn flugfoliojn al la partoprenantoj. Uzita estis ĉefe flugfolio en A5-formato preparita surbaze de teksto, kiun mi faris en la okdekaj jaroj por alia flugfolio disdonita ĉe pacmanifestacio.

Pli poste ni disdonis ĝin ĉe tre diversaj eventoj, interalie ĉe stratfesto de la SPD, dufoje ĉe la januara manifestacio, kiu memorindigas Rosa Luxemburg kaj Karl Liebknecht, en kiu la PDS tradicie ludas fortan rolon, ĉe la *Unua eŭropa renkontiĝo por homeca socio kaj kontraŭ la novliberalismo* kaj denove dufoje la unuan de majo. Eble ni disdonis sume 2000 ĉe la diversaj aranĝoj, sed neniu kalkulis.

Tio ne estas io por fanfaroni. La kamaradoj de SLEA disdonas ĉiujare multe pli da flugfolioj okaze de la Unua de Majo. Mi skribas pri tiu temo, ĉar laŭ mia impresado disdonado de flugfolioj estas utila agadformo, kiun esperantistoj emas neglekti, kaj pri kiu indas interkonsiliĝi. En Berlino, ni (la esperantistoj entute – ne nur la *Maldekstra Forumo*) sufiĉe ofte aranĝas informstandojn. Partoprenas du, tri aŭ pli da standoprizorgantoj. De tempo al tempo homoj gregiĝas ĉirkaŭ la stando por informiĝi, sed – neeviteble – multe pli ofte la agitendaj popolamasoj preterhastas kaj la standuloj postgapas ilin. Laŭcele estas eluzi tiajn tempojn por aliri la publikon per flugfolio, des pli, kiam kirliĝanta, densa homamaso povas facile eĉ tute preteratenti la standon.

Multe da homoj perceptas Esperanton kiel interesan temon (se ili scias, kio ĝi estas). Tion oni foje spertas, kiam oni parolas ĝin en publika loko kaj iu demandas, pri kiu lingvo temas. Sed ne ĉiu aŭdacas proksimiĝi al stando kaj fronti plurajn – ĉu eble fanatikajn? – homojn, kiuj atendas okazon por superŝuti iun viktimon per siaj argumentoj. (Ke la plimulto el ni klopodas *ne* kondukti tiel, neniu hazarda preterpasanto povas scii.) Krome, ne ĉiu havas tempon por halti kaj rigardi.

Eblas ja disdoni flugfoliojn sen stando kaj la organiza preparado, kiun ĝi necesigas.

Ĝis nun mi spertis okaze de surstrata disdonado, ke proksimume triono ĝis duono de la preterpasantoj prenas flugfolion, kiun oni proponas al ili. Mi konjektas, ke homoj kun malintensa scivolo pri la mondo kaj la socio, kaj kies interesokampoj kaj legemo malabundas, konsekvence rifuzas ĉiajn flugfoliojn. Okazas do ia selekto, pro kiu la informilo tendencas trafi en la manojn de legemuloj.

Ĉe politika manifestacio aperas multaj organizaĵoj kun siaj flugfolioj, kaj la granda oferto faras la homojn elektemaj, eĉ se ili estas ĝenerale pli larĝe interesitaj kaj legemaj ol hazarda surstrata maestro de la loĝantaro. Foje, sed ne tre ofte, okazas ĉe maldekstra manifestacio aŭ alia aranĝo, ke homoj demandas, pri kio temas, kaj hezitas aŭ rifuzas preni la flugfolion, kiam ili ekscias, ke temas pri Esperanto. Mi suspektas, ke tiaj homoj precize scias, kio estas Esperanto, sed supozas ĝin aŭ tute utopia afero aŭ ligita kun ia naiva, sociharmonia ideologio.

Kaj de tempo al tempo oni interparolas kun homoj dum la disdonado. Surprizas, kiel ofte tiaj homoj jam havis kontakton kun Esperanto aŭ kun esperantistoj (ofte antaŭ multe da jaroj). Foje min alparolis viro, kiu en la fruaj 50aj jaroj lernadis la lingvon sub la gvido de esperantista instruisto en lernejo en Neukölln (kaj ankoraŭ memoris unu frazon en la lingvo). Li povis ekscii de mi, ke Esperanto plu ekzistas kaj kelkriate prosperas. Mi pripensis tro malfrue, ke indus ĉerpi de li informojn pri tiu lernejpedagogia historiaĵo. En maloftaj kazoj iu forte kontraŭas Esperanton, kvankam multaj pridubas la eblecon ĝeneraligi ĝin tutmonde. La mezuman sintenon oni povas nomi «singarde pozitivaj».

Mi produktas la flugfolion ĉe la plej malmultekosta fotokopiejo, kiun mi povis trovi. Unu A4-kopio (unu flanko de A4-folio) kostas malpli ol sep pfenigojn (ĉe grandkvanta eldono) – ambaŭ flankoj la duoblon. Mi faras po du flugfoliojn sur unu A4-folio kaj poste tranĉas la foliojn tra la mezo per la aparato, kiun la kopiejo disponigas. La flugfolioj do kostas po malpli ol sep pfenigojn. Sed tio *ne* estas malmulte, se oni kalkulas la kostojn de 400 aŭ 500 flugfolioj, kiuj sufiĉe rapide fordisdoniĝas. Ankaŭ tiu cirkonstanco igis min ekverki ĉi tiun artikolon: se estas kaj interesiĝo pri la temo, kaj sufiĉa aro de disdonemuloj, LEA/G povus projekti grandkvantan ofsetan eldonon de bona ĝenerala flugfolio por surstrata disdonado. Plej bone tio okazus ne haste, sed nur post ĝenerala diskuto pri la ecoj, kiujn tia informilo por tre heterogena publiko havu.

Kreskis lastatempe la intereso pri la fako informado. *Esperanto* de UEA aperigas pri tio regulan apartan sekcion redaktatan de Geoffrey Greatrex. Marcus Sikosse, estrarano de GEJ, aperigis jam duan eldonon de sia *Proponaro por la Esperanto-informado* (Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno 1995 kaj sur la *Esperom* de GEA), en kiu li konvinke pledas por pli objektivaj kaj senmitaj informiloj. Malgraŭ rezervoj pri pluraj punktoj, mi varme rekomendas la libron al interesitoj. Mi kredas observi iom-post-ioman plibonigon de niaj informiloj dum la pasintaj jaroj. Estus konsternite, se SAT (kaj LEA/G) ne scipovus kontribui surbaze de sia specifa politika fono al la debato pri informado kaj al la pliboniga procezo.

Sur la sekvontaj du paĝoj aperas represo de nia flugfolio. Al negermanlingvaj legantoj mi povas provizi Esperantan tradukon laŭpete. Mi ŝatus ricevi ekzemplerojn de flugfolioj, kiujn oni disdonas aliloke (en kiu ajn lingvo), kiel ni dankinde jam ricevis de la SAT-Amikaro kaj SLEA.

Cetere, mi ne volus nei unu malforton de ĉi tiuj klarigadoj: ili estas spekulativaj. Ni devos akiri ankoraŭ multe pli da spertoj por diri, kia estas la efiko de la flugfolioj ĉe la publiko, kiu prenas ilin. Mi konjektas, ke ili pli utilas por altigi la ĝeneralan konatecon de Esperanto kaj ĝia loko inter streboj celantaj pli justan kaj solidarecan mondsocion, ol ili utilas por senpere varbi novajn adeptojn aŭ kursanojn.

1

Esperanto? Was ist das?

Esperanto wurde 1887 von Dr. L. L. Zamenhof, einem im russisch beherrschten Teil Polens



L. L. Zamenhof (1859-1917)

lebenden jüdischen Augenarzt, als neutrale internationale Sprache vorgeschlagen. Er wollte eine leicht erlernbare, regelmäßige Sprache entwickeln und mit Gleichgesinnten erproben, die später als internationale Zweitsprache für alle eingeführt werden

sollte. Eine neutrale, allen Menschen gleichermaßen gehörende Sprache hielt er nicht nur für

eine praktische Sache, sondern auch für einen Faktor des Friedens.

Einen Durchbruch hat Esperanto schon geschafft: es wurde eine generationsübergreifende lebende Sprache, die Hunderttausende in aller Welt gelernt haben, die nur teilweise in Verbänden organisiert sind. Der Esperanto-Weltbund (UEA = *Universala Esperanto-Asocio*) hat Mitglieder in 120 Ländern. Der kleinere SAT (*Sennacieca Asocio Tutmonda* = Nationenunabhängiger Weltbund) sammelt linkspolitisch und ökologisch aktive Esperanto-Sprecher. Esperanto hat seine Entwicklungsfähigkeit unter Beweis gestellt. Es erweist seinen Sprechern auch praktische Dienste.

2

Eine demokratische Kommunikationsreform im Weltmaßstab

Die weltweite Dominanz einiger Sprachen beruht wesentlich auf der Macht der hinter ihnen stehenden Staaten. Mitglieder nichtprivilegierter Sprachgemeinschaften kommunizieren «bergauf», wenn sie international gezwungenermaßen eine oder mehrere Hegemonialsprachen gebrauchen, die sie meist schlechter beherrschen als ihre Muttersprache.

Der internationale Gebrauch von einigen Nationalsprachen verzerrt Kulturaustausch und Informationsflüsse zugunsten bestimmter Sprachgemeinschaften, genauer gesagt, zugunsten ihrer wirtschaftlichen, politischen und meinungsbestimmenden Eliten. Die gegenwärtige Vorrangstellung des Englischen ist eine Hauptbedingung für die Eroberung der Weltmärkte durch Erzeugnisse der US-amerikanischen Kulturindustrie. Eine neutrale, leichter erlernbare Sprache könnte Ausgleich schaffen.

Manche nehmen das Sprachproblem schicksalsergeben hin und manche leben gern mit ihm, weil ihre eigenen Fremdsprachenkenntnisse karrierefördernd oder prestigeträchtig sind. Vor allem aber können die herrschenden Klassen vieler Länder gut mit dem jetzigen Zustand leben. Es liegt in ihrem

Interesse, daß die Masse der Lohnabhängigen und überhaupt die meisten Bevölkerungsschichten einsprachig oder nur begrenzt fremdsprachenkundig bleiben, da diese dann weniger Zugang zu Meinungen und Informationen aus dem Ausland finden, die nicht durch den Filter der von ihnen dominierten Medien hindurchgegangen sind, sowie sie sich weniger mit Ihresgleichen im Ausland direkt austauschen können.

Esperanto ist egalitär. Es soll ermöglichen, daß breite Bevölkerungsschichten in allen Ländern sich über sprachliche und politische Grenzen hinweg unmittelbar verständigen. Englisch, das viele als *de facto* Weltsprache ansehen, leistet dies nicht einmal in der kleinen Gruppe der relativ reichen Länder mit ausgebautem Schulwesen.

Der Gebrauch von Nationalsprachen im internationalen Rahmen ist kostspielig. Allein die EG muß jährlich über eine Milliarde DM dafür aufwenden. Ähnlich die Situation bei der UNO und anderen internationalen Organisationen.

Seine Benutzer sehen in Esperanto ein Hilfsmittel zur demokratischen Austragung von internationalen Konflikten und ein Mittel kommunikativer Gleichberechtigung.



Esperanto-Jugend-Kongreß in Polen

3

4

5

6

7

8

Kelkaj eblaj kritikoj:

- 1: Ĉu konvenus alia tiparo por la titoloj?
- 2: Ĉu estas troigo elstarigi – des pli per bildo – la personon de Zamenhof tuj komence?
- 3: Ĉu tiaj eldiroj estas interpreteblaj kiel kontraŭ-usonismaj?
- 4: Ĉu maldekstrisma lingvaĵo fortimigas kelkajn alparolatojn?
- 5: Ĉu ne malbone videbla foto? Eble alia entute pli taŭgus?
- 6: Ĉu ne estas tri milionoj, aŭ eble pli, kiuj parolas Esperanton?
- 7: Ĉu ne estas tro da «fremdvortoj» kiel *egalitär*, kiujn multaj ne komprenas?
- 8: Kaj kio pri la monda paco, kiun ni kutime elstarigas en nia argumentado?

Eine funktionierende Sprache

Verglichen mit den am meisten gelernten Fremdsprachen kann Esperanto in höchstens einem Drittel der Zeit erlernt werden. Die Schrift ist phonemisch (ein Laut=eine Buchstabe) und die Grammatik sehr regelmäßig. Sein Lautbild ist auf Internationalität angelegt. Gesprochenes Esperanto klingt etwa wie Spanisch oder Italienisch.

Esperanto ist eine agglutinierende Sprache, bei der umfangreiche Teile des Wortschatzes aus kleineren Elementen zusammengesetzt werden. So verringert sich die Zahl der lexikalischen Elemente, die extra gelernt werden müssen. Der Wortschatz entspricht dem Prinzip einer möglichst hohen internationalen Bekanntheit.

Eine für alle Zwecke taugliche Sprache kann nur in einem kollektiven Prozeß entstehen. Seit fast 100 Jahren finden Kongresse und Begegnungen statt, bei denen Esperanto gesprochen wird. Es gibt zehntausende von Büchern und mehrere hundert regelmäßig erscheinende, meist kleinere Zeitschriften auf Esperanto. Esperanto wird häufig alltägliche Familiensprache bei Paaren unterschiedlicher Herkunft (und ihren Kindern).

Esperanto entwickelt sich fort – wie andere Sprachen durch lexikalische Entlehnung und Begriffsbildung aus vorhandenen sprachlichen Mitteln – ohne seine relative Einfachheit zu verlieren.

Wie geht es weiter mit Esperanto?

Die Sprechergemeinschaft in Europa ist stabil und wächst in einigen außereuropäischen Ländern stark an (China, Iran, Afrika). Esperanto hat einstweilen mehr allgemeine Anerkennung gefunden als den meisten bekannt ist, auch wenn diese für ihre weltweite Durchsetzung als zweite Sprache für alle bei weitem nicht ausreicht. In einer Resolution hat die UNESCO 1954 «die durch Esperanto erreichten Ergebnisse auf dem Gebiet des internationalen Austausches und der Annäherung der Völker» anerkannt. Dem Esperanto-Weltbund UEA wurde im folgenden Jahr der Konsultativstatus bei der UNESCO verliehen. Er arbeitet seitdem zusammen mit anderen nichtstaatlichen Organisationen in verschiedenen Arbeitsgruppen der UNESCO mit. Diese Organisation bekräftigte 1985 den einmal eingenommenen Standpunkt und empfahl, das Sprachproblem und Esperanto an Schulen und Universitäten der Mitgliedsländer verstärkt zu behandeln.

Vor einigen Jahren verlangten 47 EG-Parlamentarier eine Untersuchung über die Eignung von Esperanto als Sprache für die Europäische

Gemeinschaft. Einige Länder haben Esperanto für den Schulunterricht zugelassen. Die Universität Budapest hat eine Esperanto-Abteilung, und andere Hochschulen bieten Lehrveranstaltungen in und über Esperanto an, beispielsweise die Universität Saarbrücken. Staatliche Stellen geben Informationsmaterial, z.B. touristisches, in Esperanto heraus und Rundfunksender mehrerer Länder strahlen täglich Sendungen in Esperanto auf Kurzwelle aus.

Langfristig fördert die dichter werdende Vernetzung der Welt eine stärkere Wahrnehmung des internationalen Sprachproblems. Die Chancen des Esperanto werden sowohl vom Ausmaß der praktizierten internationalen Zusammenarbeit wie vom öffentlichen Druck abhängen, der in vielen Ländern ausgeübt werden muß, und der sich nur in einem politischen Klima entfalten kann, in dem radikaldemokratische und internationalistische, sowie weltpolitisch und innergesellschaftlich egalitäre Bestrebungen kräftiger als derzeit wirksam werden. Der praktische Gebrauch von Esperanto soll heute ein entsprechendes Klima antizipieren.

Für viele erweist sich Esperanto schon heute als nützlich

Viele haben durch Esperanto bei geringem Lernaufwand weltumspannende Kontaktmöglichkeiten erschlossen. Manche machen in Fachverbänden, Ortsgruppen, Landesverbänden oder internationalen Organisationen mit. Die meisten Esperanto-Sprecher benutzen ihre Sprachkenntnisse auf Reisen, indem sie mit Bekannten Kontakt aufnehmen bzw. durch eines der Adressenverzeichnisse Kontakt knüpfen, z.B. durch den Pasporta Servo,

in dem 906 Personen aus 72 Ländern enthalten sind, die andere reisende oder Urlaub machende Esperanto-Sprecher für eine begrenzte Zeit beherbergen. Über das ganze Jahr finden Dutzende von internationalen Treffen, Tagungen und Freizeitaktivitäten statt, die sich häufig mit aktuellen gesellschafts- und kulturpolitischen Fragen beschäftigen.

(V.i.S.d.P.: Gary Mickle)

weitere Information: Esperanto-Centro Berlin, Falkstr. 25, 12053 Berlin, Tel.: 687 31 30

Kelkaj eblaj kritikoj:

- 9: Kiom da homoj komprenas entute lingvistikajn ĵargonaĵojn kiel *phonemisch*, *agglutinierend*, *lexikalisch*?
- 10: Ĉu la praktika utiligo de Esperanto ne meritis multe pli ampleksan pritrakton?
- 11: Kio pri la 16 reguloj, kiujn ni ĝis nun ĉiam elstarigis?
- 12: Ĉu fakte la eventualaj larĝskalaj venkoŝancoj de Esperanto vere dependas de tia maldekstra-progresiva politika klimato, aŭ ĉu ne pli de la daŭre akriĝanta monda lingva problemoj?
- 13: Ĉu ne temas ĉi tie pri tradiciaj nerealismaj esperoj kaj celadoj, kiuj laŭ la rezonado de la Manifesto de Raŭmo malaktualiĝis?

Sur la antaŭaj du paĝoj mi provis anticipi kelkajn kritikojn, kiujn oni povus fari pri la flugfolia teksto. Mi ne nepre aŭ eble nur parte agnoskas la validecon de tiuj argumentoj, sed mi enmetis ilin provokcele – mi esperas, ke kelkaj gekamaradoj reagos letere kaj konatigos sian opinion en la *Magazino*. Pro tio mi ne traktos nun la demandojn, kiujn mi levis. Kaj eble mi tute eraras tiurilate – oni eble trovos tute aliajn aferojn, pri kiuj mi eĉ ne pensis, kritikindaj.


Ŝajnas al mi, ke la flugfolia informado prezentas kelkajn defiojn, kiujn oni povas respondi ne ĉiel kontentige, sed nur parte kaj per malfacilaj kompromisoj:

- Kiel alparoli publikon, kies nivelo de formala klereco estas tre diversa?
- Kiel atingi kompreneblecon, sufiĉan koncizon kaj sciencan ĝustecon?
- Kiel fari klarajn politikajn eldirojn, konvenajn unuavice por la alcelata maldekstrema publiko, kiuj tamen ne forpuŝos homojn, kiuj fremdas en tiu medio?
- Ĉu estas politika oportunismo aŭ normala prudento eviti ĉion potencie ŝokan al la nemaldekstruloj?
- Kia estu adekvata ekvilibro en la prezento inter la celo de la Esperanto-movado kaj la nuna realo de Esperanto kaj ĝia utiligo?
- Kiel prezenti entute en limigita spaco «la celon» de la movado sen tordi la veron?
- Kiel fari la prezenton atentokapta eĉ por tre supraĵe interesitaj legantoj, sed samtempe informa por pli serioze interesitaj?

Cetere, ni povas nun per komputilo ĉiam pli facile kaj efike produkti seriozaspektajn, eĉ imponajn grafikajn ellaboraĵojn. La montrita flugfolio tute ne estas grafika juvelo, kvankam laŭ mi ĝia aspekto estas akceptebla, ĝis estos farita io pli definitiva en pli granda eldonkvanto. Kiu jam spertiĝis pli ol mi pri grafiko kaj tipografio, eble kiel aplikanto de pli funkcionaj programoj, eble klopodu projekti pli artisman flugfolion. Ni volonte prezentus la laborrezulton en la *Magazino*!

Mi uzis por ĉi tiu ŝajne iom banala temo multe da loko, ĉar mi esperas, ke venos kelkaj reagoj, kiuj helpos projekti belan, inteligentan kaj honeste informantan flugfolion por ĝenerala uzado, kiun oni povus eldoni (verŝajne ofsete) en multmila eldonkvanto je poekzemplera kosto de *maksimume* 3 aŭ 4 pfenigoj, sed prefere malpli – ĉar malmultekosteco estas esenca kondiĉo por rutina amasa disdonado.

Gary Mickle



Kaj jen
mia opinio!
Kaptu la
atenton
de la homoj
per pli
frapaj
argumentoj!



Frapaj eldiroj ĉerpitaj el diversaj informiloj

«La inventinto de la Esperanto-lingvo estas Ludwik Zamenhof...»

«Tamas...pri la plej esprimkapabla lingvo, kiun la homaro sukcesis krei.»

«lingvo, kiu uzas nur 16 gramatikajn regulojn kaj senriproĉan logikon»

«la lingvo plej facila kaj plej perfekta de la mondo»

«la unua kaj la sola normala lingvo»

«...kiuj estas la motivoj, kiuj ĝis nun malhelpis la ĝeneralan akcepton de io tiel racie utila kaj rekomendinda? Sendube la politika kaj ekonomia potenco de la nun superregantaj anglalingvaj landoj.»

«Kiu postulas ne ESPERANTON, sed alian lingvon kiel komunan lingvon por Eŭropo, ne estas demokrato...»

(Ĉitaĵoj el Esperanto-informiloj ĉerpitaj el **Proponaro por la Esperanto-informado** de M. Sikosek kaj el la propra kolekto de la aŭtoro)

Mi petas direkti rimarkigojn kaj komentojn destinitajn por publikigo al la redakcio de la *Magazino*. Personajn komunikaĵojn kaj ekzemplerojn de aliloke faritaj flugfolioj, kiujn la aŭtoro dankeme ricevas, bv. direkti al:

Gary Mickle, Brüsseler Str. 6,
DE-13353 Berlin, Germanio.

Mia penso**L. L. Zamenhof**

Sur la kampo, for de l' mondo,
antaŭ nokto de somero,
amikino en la rondo
kantas kanton pri l' espero,
kaj pri vivo detruita
ŝi rakontas kompatante, –
mia vundo reŝrapita
min doloras resangante.

«Ĉu vi dormas, ho sinjoro,
kial tia senmoveco?
Ha, kredeble rememoro
el la kara infaneco?»
Kion diri? Ne ploranta
povis esti parolado
kun fraŭlino ripozanta
post somera promenado!

Mia penso kaj turmento
kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
al vi iris jam oferoj!
Kiun havis mi plej karon¹
la junecon – mi ploranta
metis mem sur la altaron
de la devo ordonanta!

Meine Gedanken**L. L. Zamenhof**

*Auf dem Lande, vor dem Städtchen,
sommerabends in der Runde,
von der Hoffnung singt das Mädchen,
und es klingt aus seinem Munde
wie aus fernem Kindertagen.
Und es singt so traur'ge Lieder;
so als wär' sie aufgeschlagen,
blutet meine Wunde wieder.*

*«Warum sind Sie so verschwiegen,
lieber Herr?» hör ich sie fragen.
«Ist's Erinn' rung?» – Sollt' ich lügen?
Ach, ich kann es ihr nicht sagen!
Weinen müßt' ich, wenn ich's sagte,
Wozu sollt' ich sie betrüben?
Und was nützt es, wenn ich klagte?
Wär' ich doch nur fern geblieben!*

*All mein Denken und die Fülle
meines Hoffens, meiner Schmerzen –
wieviel in der Kammer Stille
opfert' ich von ganzem Herzen!
Ach, das Teuerste im Leben
gab ich hin für eine Sache,
meine Jugend, all mein Streben,
für die Allgemeine Sprache.²*

Verkita de Zamenhofo, Ludoviko Lazaro (1859-1917).

Germanigo fare de Manfredo Ratislavo de la origina internacilingva teksto de Ludoviko Lazaro Zamenhofo 1997 01 21.

Frei ins Deutsche übersetzt von Manfred Retzlaff am 21.01.97, nach dem Originaltext von Ludwig Lazarus Zamenhof.

¹ anstataŭ «Kion havis mi plej karan», kiel origine skribis Zamenhofo, pro la pli konvena rimparo «karon – altaron».

² oder: für die Esperanto-Sprache

Ĉu Esperanto estas politika afero?

Ĉi-foje nur du opiniesprimoj pri tiu ĉi demando:

Esence dependas la respondo de la celo, kiun oni atribuas al tiu lingvo.

Respondas «NE!» tiu, kiu nur ĝin konsideras kiel hobion, kiel praktikan ilon por interŝanĝi poŝtmarkojn kun partneroj dise tra la mondo, aŭ trovi eksterlandajn kontaktadresojn por etkoste vojaĝi.

Sed Esperanto ludas alian rolon, kiam ĝi estas uzata kiel tutmonda interkomunikilo celanta disvastigi ideologion, filozofion, kiel ekzemple: SAT. Tiurilate, ĝia statuto estas tre klara: «estas fondita Asocio, kiu celas a) utiligi praktike la internacian lingvon ESPERANTO por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda...»

En tiaj kondiĉoj, evidentas, ke la respondo estas: JES, Esperanto estas politika (larĝa senco de la vorto) afero, ĉar politike ĝi estas uzata.

Mi ne dubas, ke la gelegantoj de *Magazino* apartenas al la dua kategorio.

La vorto «Esperanto» elvokas kaj ĉe la publiko kaj ĉe la plimulto de ĝiaj parolantoj la imagon pri ia kompleksa unuaĵo el lingvo, lingva komunumo kaj socia/politika celaro. Eĉ la lingvistika pritrakto de ĝi ofte ne restas sur la ebena de pozitiva scienco, sed forglitas sur la ebenon de lingva kritiko resp. lingva apologio. Kaj la kritiko aŭ apologio rilatigas sin senpere al la socipolitika celaro de la lingva komunumo.

Kion mi nomas «socipolitika celaro», Zamenhof nomis «interna ideo». Tiun li kontraŭstarigis – aplaŭdate de la plimulto de esperantistoj – al pure praktika/utilisma kompreno pri la celeco de la lingvo. La Zamenhofa «interna ideo» estas klare politika. Ĝi estis eksplicite porpaca kaj damnis la interetnan malamon en epoko, en kiu gravaj segmentoj de la politika spektro nesingene

gloris la militon kiel institucion kaj ekzaltite adoris la nacian dion. Hodiaŭ eĉ reakciuloj evitas almenaŭ glori la militon (ĉe ni).

La movado de nia epoko kiel tuto refalus malantaŭ la politikan progresivecon de Zamenhof, se ĝi ne scipovus alfronti per la *socie egalisma* (kaj ne nur la *interetne egalisma*) komponanto de la esperantismo la aktualan «spiriton de la epoko» kun ties nesingena apologio de profundigantaj enspezdiferencoj, kubutismo, konkurenco kaj nekaŝita entuziasmo pri elformado de elitoj.

SAT refalus malantaŭ la politikan nivelon de siaj fondintoj, se ĝi ne plu scipovus aldoni al tio ion pli specifan: la rektan atakon kontraŭ la ekzistanta socia ordo, kaj ne nur kontraŭ kelkaj aperaĵoj en ĝi.

La sistemo de lingva maljusteco en la mondo estas parto de la sistemo de maljusto entute. Ataki la nunan lingvan ordon signifas ataki unu malgrandan eron de la neegaleca monda socia sistemo. *Eksplicite* ataki kaj la lingvan ordon kaj la fonan socian ordon, signifas agiti en maldekstra senco. Sed tia duobla atako havas la logikan konsekvencon, ke estu alprenita specifa movad-interna starpunkto, ĝia korolaro, kiu enkadrigas la mondan ĝeneraligon de Esperanto en la premisenda maldekstrenira fluo de ĝeneralaj politikaj eventoj. Tia movada starpunkto estus evidente ne raŭmisma, sed ankaŭ ne klasiktipe finvenkisma (t.e. laŭ la «tradicia esperantista ideologio», kiel Sikossek nomas ĝin).

Tiu koncepto pri la politikeco de Esperanto kaj ĝiaj praktikaj sekvoj kunplektas en dialektika unueco la evoluon de la monda politiko kaj la movadan strategion, la informadon pri Esperanto kaj la ĝeneralan politikan agitadon. Unu problemeto: ĝi ne estas akordigebla kun la en SAT kaj aliloke tradicie farata zorga distingo inter «peresperanta» kaj «poresperanta» agado, sed kombinas unu kun la alia.

lingva
angulo

Pri «Idiotismoj»

de W. E. Collinson

(iama profesoro pri germana lingvo ĉe la Universitato Liverpool)



El la greka adjektivo *idios* 'propra, aparta' deriviĝas du lingvosciencaj vortoj, kiuj atingis grandan internaciecon, nome *idioma* kaj *idiotismo*. En la plej multaj eŭropaj lingvoj la formo *idiom* aplikiga kiel en Esperanto. — oni vidu la Plenan Vortaron — al 'lingvo propra al nacio aŭ provinco', ekz. en la franca *l'idiome bourguignon*, kie ĝi estas pli vasta ol *patois*. Ankaŭ en la angla oni povas ankoraŭ uzi *idiom* en tiu senco, tamen jam ekde la 17-a jarcento la vorto plej ofte sinonimas kun la eksmodiĝinta *idiotism*, kiu troviĝas en fr. *idiotisme*, germ. *Idiotismus* ktp. La P. V. citas de Zamenhof du frazojn, en kiuj li uzis tiun lastan terminon: „ankaŭ en Esperanto troviĝas diversaj nemultaj idiotismoj“ kaj „lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estas lingvo sen viva kaj tro peza“. La vortaro mem difinas la radikon *idotism* jene: 'nelogika aparta vortkonstruo, popra al iu lingvo, sed ne al aliaj'. La difino atentigas pri tri karakterizoj, nome (1) nelogikeco, (2) aparteco kaj (3) unikeco. Ĝenerale la formulado estas akceptinda kaj sufiĉas. Tamen ekzistas kelkaj limesprimoj, kiuj ne kombinas ĉiujn tri ecojn, sed pro diversaj kaŭzoj ŝajne meritas esti rigardataj kiel 'idiotismoj'. Por ampleksi la diversajn gradojn mi mem preferus formuli la difinon duope:

(1) uzo de esprimo (= vorto, afikso, fleksio aŭ vortgrupo) popra al iu specifa lingvo aŭ grupo da lingvoj, sed ne universale akceptebla, ekz. la anglaj esprimoj *cut* por 'intence ignori aŭ eviti' (kp. la pruntosignifon de germane *schneiden*), *baby-sitter*, *teenager*, *new look*; (2) plurvorta esprimo, kies signifo ne rezultiĝas senpere el la sumo de la signifoj de ĝiaj unuopaj vortoj, negative ĉu la esprimo estas popra al nur unu lingvo aŭ troviĝas en pli ol unu lingvo.

Jen estas ekzemplo de nelogika vortkonstruo aŭ parolturno, kiu efektive estas uzata en sufiĉe multaj eŭropaj lingvoj: En la ĉefaj kulturlingvoj de okcidenta, norda kaj meza Eŭropo la koncepto 'malpaciĝi', 'disiĝi', 'kvereli' povas esprimiĝi per vortkonstruo, kiu unuavide signifas 'rompi kun iu', ekz. angle *break with*, germ. *brechen mit*, fr. *rompre avec*, svede *bryta med* ktp. Verŝajne temas pri 'elipso', en ĉi tiu kazo pri ellaso de la objekto. Tamen estas malfacile decidi, ĉu tiu objekto estis 'interrilatoj' aŭ ĉu la origino estas la franca esprimo *rompre paille avec*, kiu aludas al la ago 'rompi pajleron' por simboli la disiĝon de du amikoj. Ĉiuokaze 'rompi kun' havas nededukteblan senco kaj estas en Esperanto malakceptinda.

Kiam temas pri lingvaj apartaĵoj, ni emas paroli pri anglismoj, germanismoj ktp. Ĉu oni rajtas paroli pri 'esperantismoj', t.e. apartismoj de Esperanto? Certe mi ne celas per tio nelogikaĵojn, ĉar se Esperanto diferencigas sin de siaj kunlingvoj, estas fakte pro plenlogikeco, eĉ superlogikeco! Mi mem 'kalkulus' kiel Esperantismojn la senliman uzon de afiksoj, kvazaŭ ili estus plenaj radikoj, ekz. *igi, ema, ulo, aĵo, eco, ano, aro* ktp.; la kombino de tiaj sendependaj afiksoj, ekz. *erigi, disiĝi, ilarujo*; la duobligo en *plenplena, finfine*; la diminutivo *iomete*; la rekta formado de nepersonaj verboj el adjektivaj kaj substantivaj radikoj, ekz. *gravas, necesas, temas pri*; la kunfandiĝo de imperativo, konjunktivo kaj optativo sub unu formo en *-u*, formo kiun oni povus nomi 'volitivo', ekz. [kion ni] *faru*?

Tio sufiĉas por montri la nuancitecon kaj komplikecon de la problemo de 'idiotismoj'. Mia opinio Zamenhof estis tute prava, kiam li nepre volis elekti la mezan vojon. Ĉiun kazon de 'idiotismo' oni juĝu laŭ ĝiaj propraj meritoj!

Pro ĝena pensasocio kun idiot kelkaj parolantoj evitas la formon idiotismo. Por ili mi sugestus la vorton idiomaĵo kiel uzindan.

EI Laborista Esperanta Movado antaŭ la mondmilito (= antaŭ la 1-a mondmilito) Faktoj kaj dokumentoj kolektitaj de G. P. de Bruin, SAT Parizo (1936)

En Germanio

En Germanio fondiĝis en la jaroj 1908–11 laboristaj esperantistaj grupoj en Berlino, Dresdeno, Hamburgo kaj aliaj urboj. Jam baldaŭ oni sentis la bezonon pri kunligo laŭ nacia skalo kaj el tio rezultis en 1911 la fondiĝo de la *Germana Laborista Esperantista Asocio (GLEA)*.

Al la naskiĝo de GLEA antaŭiris epizodo, en kiu li *Leopold Schlaf*, komercisto en Dresdeno, ludis strangan rolon. Tiu *Schlaf* "starigis" en 1910 t.n. *Germanan Laboristaran Esperantistan Ligon*. Ĉi tiu organizo ekzistis nur sur papero. Ne okazis kongreso, ne okazis elektoj, ne ekzistis regularo, eĉ mankis plena estraro. Ĝi nur havis prezidanton kaj tiu estis nomita *Schlaf*. En aŭgusto 1910 *Schlaf* komencis eldoni monatan gazeton *Der Arbeiter Esperantist* (La Laborista Esperantisto), oficiala organo de supre nomita "Ligo". Aperis de ĝi 8 numeroj, ĝis marto 1911. La enhavo, kvankam plejparte germanlingva, ne estis tre propagandiga. Estis en ĝi multaj artikoloj kontraŭ ldo, kies adeptoj eĉ per cirkuleroj al la grupoj klopodis konverti ilin al tiu lingvo. En la unua numero de la gazeto troviĝis provizora regularo kaj komuniko, ke en decembro okazos kongreso. En la tria numero ni trovas la adresojn de 30 grupoj. Supozeble inter ili estis ankaŭ ĵus starigitaj kursoj. Tamen estis ankaŭ kelkaj, kiuj estis sufiĉe memstaraj kaj kapablaj kaj ili havis pri organizaj aferoj aliajn ideojn ol la "prezidanto". Ĉi tiu agis tute aŭtokrate; li prokrastis la okazontan kongreson, ne enpresigis proponojn kaj protestojn ktp. Pro tio la grupo en Hamburgo turnis sin per cirkulero al diversaj grupoj, plendante pri la agado de "prezidanto" kaj konigante al ili siajn proponojn. Responde al tio *Schlaf* eksigis la hamburgan grupon.

Fine en aprilo 1911 en Lajpcigo okazis la kongreso. La unua grava punkto de la tagordo estis la agado kaj konduto de *Schlaf*. Ĉi tiu klopodis pravigi sin, sed ne sukcesis. Montriĝis, ke li agis ne nur nedemokrate, sed ankaŭ profite al sia propra poŝo. Sekve de ĉi ĉio li estis eksigata kaj forigata el la kongresejo. La fino de ĉi tiu malagrabla afero estis proceso kontraŭ GLEA, kiu *Schlaf* akuzis pro ofendo. Ĝi finiĝis per akordo en kiu la kulpo de *Schlaf* estis plene konstatata kaj la ofendintoj reprenis siajn ofendajn vortojn.

Oni devas konfesi, ke *Schlaf* estis bona oratoro kaj propagandisto. Li faris paroladojn en multaj urboj antaŭ granda publiko kaj vekis intereson por esperanto ĉe multaj laboristoj. Kelkaj grupoj povis post lia parolado komenci kursojn kun 75 kaj eĉ kun 200 partoprenantoj... Nur estas bedaŭrinde, ke *Schlaf* tro atentis sian propran monujon.

Fintraktinte la aferon rilate al *Schlaf* la kongreso eklaboris. Oni fiksas la regularon, elektis estraron kaj decidis eldoni monatan gazeton. Estis reprezentitaj 45 grupoj, el kiuj 25 kun ĉ. 600 tuj aliĝis. GLEA rapide kreskis. En 1912 ĝi havis 63 sekciojn kun pli ol 1000 membroj, en 1913 jam 70 kun 1400 membroj. La organo *Antaŭen* aperis regule ĉiumonate, 8-paĝa. Kvankam ĝi de komence portis la adreson de *F. Zuckaroll* kiel redakcejon, tamen montriĝas el komuniko de la asociestrararo en la numero de majo 1912, ke ĝis tiu dato *Oscar Bünemann* redaktis ĝin. La enhavo estis plejparte esperantlingva. Troviĝis en ĝi rakontoj, skizoj, sciencaj artikoletoj, grupaj raportoj, ekzerco-rubriko kaj scilgoj de la estraro. Precipe ĝi celis informi kaj pliperfektigi siajn legantojn. Propagandilo por neesperantistoj ĝi ne estis.


Aliaj eldonaĵoj de GLEA estis *Adresareto*, kiu enhavis la adresojn de ĝiaj sekcioj kaj kelkajn el la eksterlando, kaj germanlingva propaganda broŝuro *Der Deutsche Arbeiter und die Welthilfs-sprache Esperanto* (La germana laboristo kaj la mondhelpingvo esperanto).

Kiel estraranoj de GLEA funkciis ĝis aŭgusto 1914:

F. Hegewald, Henneberger, A. Mehlhorn, A. von Riesen, E. Schmiedel, A. Schlemeck, G. Stein, Wegner kaj F. Zuckaroll.

kopita K.H.K.

Altiganta kurzo en universitata medio



Esperanto-riataj tezoj kaj disertacioj, de 1906 ĝis 1985 pojardeke (el: SAT-Amikaro Service de Presse 1997 07)

Ĉu vi jam estas esperantisto?

- 1: En kiu aĝo ekinteresis vin Esperanto? (In welchem Alter interessierte Sie Esperanto?)
- a) en aĝo inter 5 kaj 12 4 poentoj
b) inter 13 kaj 40 3 "
c) pli ol 40 2 "
- 2: Ĉu vi lernis/lernas Esperanton en kurso aŭ aŭto-didakte? (Lernten bzw. lernen Sie Esperanto in einem Kursus oder ohne Lehrer?)
- a) en kurso 4 poentoj
b) aŭtodidakte 2 "
c) mi ĵus eklernis en kurso 1 poento
(habe kürzlich einen Kurs begonnen)
- 3: Ĉu vi opinias esti kapabla gvidi kurson? (Meinen Sie, einen Kurs leiten zu können?)
- a) jes 4 poentoj
b) eble jes, kiam mi finos kurson 2 "
(vielleicht, wenn ich einen Kursus beendet habe)
c) ne 0 "
- 4: Ĉu vi jam partoprenis kongreson? (Haben Sie schon einen Kongress mitgemacht?)
- a) jes 4 poentoj
b) mi intencas 2 "
(ich beabsichtige es)
c) mi ne partoprenos kongreson 0 "
(ich nehme an keinem Kongreß teil)
- 5: Ĉu vi flegas amikecon per leteroj skribitaj en Esperanto? (Haben Sie freundschaftliche Briefkontakte per Esperanto?)
- a) jes 4 poentoj
b) ne, sed mi bonvenigus tiajn kontaktojn (ich würde solche Kontakte begrüßen) 2 "
c) mi ne ŝatus (ich möchte nicht) 0 "
- 6: Ĉu vi konas la vorton «vrako»? (Kennen Sie das Wort «vrako»?)
- a) Ĉu estas vestaĵo por sinjoroj? 1 poento / jes
(Ist's ein Herrenkleidungsstück?) 3 poentoj / ne
b) Ĉu estas ruino de ŝipo? 3 poentoj / jes
(Ist's eine Schiffsruine?) 0 " / ne
c) Ĉu estas kargo? 0 " / jes
(Ist es Schiffsfracht?) 3 " / ne
- 7: Ĉu vi opinias esti jam esperantisto? (Glauben Sie schon Esperantist zu sein?)
- a) jes, mi estas 4 poentoj
b) mi estas sur la vojo al tio 2 "
c) mi ne estas jam 1 poento

Taksado de la testrezulto

- 3 ĝis 10 poentoj: Vin interesas lerni Esperanton. Vi estos esperantisto, kiam vi konos la gramatikon kaj ĉ. 800 Esperanto-vortojn, kiujn vi povos uzi por simplaj interparoloj. (Es interessiert Sie, Esperanto zu lernen. Sie werden Esperantist, wenn Sie die Grammatik und ca. 800 Esperanto-Wörter für die einfache Unterhaltung beherrschen.)
- 11 ĝis 15 poentoj: Vi estas sur la vojo paroli kaj legi la lingvon kaj fariĝi esperantisto post kelka tempo. (Sie sind auf dem besten Weg, in kurzer Zeit Esperanto zu sprechen und zu lesen; sie werden dann Esperantist sein.)
- 16 ĝis 20 poentoj: Vi estas nun esperantisto, tamen flegu la lingvon.
- 21 ĝis 27 poentoj: Gratulon, vi estas perfekte parolanta esperantisto.

A. S.



Aforismoj

Ekzistas homoj, al kiuj la aĝo blankigas la harojn, sed tute ne tuŝas la koron, kiu restas ĉiam en plena freŝeco kaj juneco kaj ĉiam kun egala forto batas por ĉio bela kaj bona. Ĉiujfoje kiam mi vidas tian homon, mi diras al mi: jen estas bela minuto en mia vivo!

10an Augusto 1905
(unua kongreso esperantista en Boulogne-sur-Mer)
L. L. Zamenhof

Anstataŭ blufadi per "milonoj da esperantistoj" kaj similaĵoj, oni informadu pri la admirindaj objektivaĵoj de nia lingvo sur kultura kampo kaj por praktikaj celoj surbaze de faktoj kaj bonaj argumentoj, ne fantaziaĵoj. Se oni ne kapablas agi tiel, pli bone estas silenti: saĝe silenti estas en ĉiu okazo pli utile, ol malsaĝe skribi aŭ paroli.

Ivo Lapenna (1987)

Se tiu ĉi kvadrato estas ruĝa, via kotizo por 1997 ne jam atingis la kasiston ĝis la 1997.
Bv pagi!

Apernotoj / Impressum

Eldonanto / Herausgeber:

Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj / Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete

Renchener Str. 47, D-77704 Oberkirch

Tel.+Fax: (0)7802 - 90 336

LEA/G per SAT en TTT:

<http://www.worldnet.net/~sat-esp/>

Redakcio / Redaktion:

Albert Stephan (AFS)

Gary Mickle, Berlin (G.M.)

Hans Rodewig, Hannover (H.R.)

Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj; la redakcio havas la rajton mallongigi aŭ rifuzi alsendaĵojn.

MAGAZINO aperas kvarfoje jare / erscheint vier Mal jährlich;

abonprezo / Bezugspreis 15,- DM

La membrokotizo entenas liveradon de la bulteno.

LEA/G-konto: Sonderkonto Kersting

n-ro 416 210-432 Postbank Essen

(BLZ 360 100 43)